

KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO - ASOCIO

numero 266 (33) - kvina epoko - februaro 1990

**JEN LA IMPONA MONUMENTO 12-
METROJN ALTA EN SABADELL**
(priinaŭguran raporton legu
sur paĝo tria)



ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
(Enregistrita de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat /Poŝtkesto, 290 - 08200 Sabadell- Catalunya/Katalunio. Telefonnumero (93) 716.3633(ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.)Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1989: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 3200 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto : Jordi Carbonell i Pinyol; Vicprezidanto: Maria Garcés i Coll; Ĝenerala Sekretario : Llibert Puig i Gandia; Kasisto: Óscar Puig i Cánovas; Komitatanoj : Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guiñón; Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO : Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario)

FLORLUDAJ MAJSTROJ : Clarence BICKNELL (3 aj IFL, Olot 1913), Artur DOMÈNECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot 1984), Timothy BRIAN CARR (28aj IFL, Barcelona 1988)

PEDAGOGIA KOMISIONO : Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO : Jordi Carbonell i Pinyol-Avda. del Paral.lel, 96-6è-Tel. 329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ : Centre d'Esperanto Sabadell, Apartat, 407, Papa Pius XI, 130-tl.(93) 716.3633, 08200 Sabadell; Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto Grupo, St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto - Grupo, St. Josep, 20- 08922 Sta. Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/ Departament d'Esperanto, Mallorca, 207 - pral. tel. (93) 253.9507, 08036 Barcelona; Esperanto - Centro Tarragona, Apartat 1236- 43080 Tarragona; Esperanto-Fako "S.C. Jovenut Terrassenca", St. Francesc, 52 08221 Terrassa; Esperanto Grupo "Jozefo Anglès", Apartat, 336-08190 Sant Cugat del Vallès; Firma Tero Esperanto - Fako Centre Comarcal Lleidatà, Gran Via, 592 08007 Barcelona; Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal, Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau d'Ordal; Ĝirona Espero, Apartat, 509 -17080 Girona, Hispana Esperanto - Fervojis - Asocio ĉe Stacidomo Sants- Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada, Baixada de Sant Nicolau, 21 08700 Igualada. Dipòsit Legal : B- 27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. 725.5091 Sabadell.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf : Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893. 7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès : Joan Torres i Nalda. Escola Llar . Ctra. de la Canya ,
s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà , Baix Empordà, La Selva : Ĝirona Espero, Apartat,
509 - 17080 Girona (Gironès)


Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp : Josep Ma. Serrano, Edifício Europa
B-2-1 (St. Pere i St. Pau)tel. (977)218941 - 43007 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre , Montsià : Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel.-
(973)442009- 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears : Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830
07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord : Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000
Perpinyà (Rosselló)

1 * IGUALADA * * * E-RENDEVUO



23-24-25an de Marto 1990a !!

vendredon 23an -je la 18a h.akceptado de partoprenantoj ĉe la stacidomo kaj poste vizito de la urbo, Esperanto-klaso, vespermanĝo, Igualada artvespero kaj noktumado.

sabaton 24an -je la 10 h.murpentrado, libroservo kaj surstrata enketado kaj poste Esperanto-klaso, tagmanĝo, prelego fare de irana ĵurnalisto Mohammad-Reza Kheir-khah video-filmo, vespermanĝo, Esperanta artvespero kaj renoktumado.

dimanĉon 25an-je la 10 h.ekskurso al la

"Tossa" monteto kun romanika preĝejo, komuna tagmanĝo, lotado de 5 ekz. de la fama pola verkaĵo "Sinjoro Tadeo", malsolena fermo kaj ĝisado (lastaj informoj inter la Grupoj).

Junulara restadejo senpaga por la 20 unuaj aliĝintoj.

Rendevuejo: "Servei Comarcal de la Jovenut" Placo St.Miquel, 12.

Igualada E-Grupo: Baixada de St.Nicolau, 21.

MEMORU LA LABORKUNVENON DE KEJ la 28an kaj 29an de aprilo en La Sala (Pobla de Lillet) en kiu oni preparos la katalunan partoprenon en la someraj internaciaj aranĝoj.

INAŬGURA RAPORTO DE LA ZAMENHOF - MONUMENTO EN SABADELL

Finfine Katalunio havas la unuan monumenton honore al la aŭtoro de Esperanto, kaj tio ĝojigas nin ĉiujn. Ĝi staras impone sur la jam mondfama Avenuo Zamenhof, kiu baldaŭ fariĝos verŝajne la plej grava urba komerca centro.

La genezo de la monumento estis longa kaj ne ĉiam facila. Laŭ iniciato de la loka Grupo Centro de Esperanto Sabadell, formiĝis civitana komisiono - fakte nur esperantista - kiu strebis pli ol du jarojn. Al ili nian dankemon!

Oni alvokis la esperantistaron al mona kunlaboro - ankaŭ al tio nia Asocio solidariĝis kaj ĝi alvenis, sed ne sufiĉe, interalie ĉar la buĝeto estis plurmiliono. La afero estis tamen sub la patroneco de la Urbestro. La inaŭguron oni antaŭvidis koincide kun la ĉiujara loka Zamenhof-Festo, tial la 17an de decembro, la plej proksima dimanĉo al la naskiĝdatreveno de la aŭtoro.

La loka Grupo pretigis taŭgan programon jene: infana desegno-konkurso pri la monumento kun profesia ĵurio kaj multaj premioj por la partoprenantoj, donacitaj de lokaj komercejoj; koncerto de la kataluna kaj juna ensemble "Kordoj" ĉi-foje kvaropa, kiu regalis per tre interesa repertuaro la pli ol 200 ĉeestantajn geesperantistojn, inter ili kelkaj eksterlandanoj.

Aldone oni lanĉis la membrokampanjon de UEA kaj disponigis la grupan libroservon al la aĉetemo de la esperantistaro.

Tagmeze kiel programite okazis la solena inaŭgura ceremonio, kiun prezidis la urbestro s-ro Antoni Farrés i Sabater (sur la foto dum lia interveno). Akompanis lin sur la podio d-ro Ulrich Lins UEA-vicprezidanto, s-ro Pere Soler, prezidanto de la Civitana Komisiono (dua de maldekstre) kaj aliaj komisionanoj.


Tuj post la paroladoj, la urbestro kaj d-ro Lins malkovris la tabulon ĉe la piedoj de la monumento kun teksto en la kataluna kaj Esperanto kaj flankigita de bela busto de Zamenhof. (vidu foton)

Sekvis dancado de "sardanoj" - popularaj katalunaj dancoj - kaj komuna tagmanĝo de la esperantistoj en proksima restoracio.



Memorinda tago, kiu havis tamen kelkajn negativaĵojn, unue la neeviteblan subite aperantan ventegon dum la ceremonio, due la du eviteblajn erarojn en la tabula teksto: Zamenhof naskiĝis la jaron 1859 ne en 1858 kaj la inaŭguro okazis la 17-an de decembro, ne la 15an. Kaj laste, sed plej grave la interpretadon dum la ceremonio kaj la paroladon dum la tagmanĝo, ambaŭ fuŝaj kaj neekzempligaj, ĉefe ĉar la rolantoj estas gvidantoj en nia movado. Ĉu nia afero ne meritas pli seriozan sintenon?

Il.p.g.



INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO EN NICO

DE LA 29^a de JUNIO ĜIS LA 6^a de JULIO

✻ 1990 ✻

Cravivu unu semajnon da turisma restado sur la Lazura marbordo en esperantista etoso...

de Hektor Alos i Font

Ekzistas certa nombro da fonetikaj apartaĵoj, kiuj igas la katalunojn facile re-koneblaj disde la ceteraj esperantistoj. Fakte tiuj eroj kutime ne malfaciligas la komprenon por alilandano, sed donas ias pecan katalunan koloron al niaj diraĵoj. Tio unuflanke povas aperi por kelkaj kiel eĉ bela, ĉar lingvo unuforma fariĝas peza, kaj ne ekzistas genta lingvo malhavanta idiomojn. Aliflanke ĉiu sentema esperantisto devas prave timi la disdialektiĝon de la internacia lingvo, kio iam kondukus al nekompreniĝoj kaj al perdo de valideco de Esperanto kiel tutmonda komunikilo. Sed pli proze ni povas timi ankaŭ la morkojn de alilandanoj pri nia kurioza prononco de diversaj fonemoj. Verŝajne, kiel mi, tion spertis jam pluraj el vi, kaj ne ĉiam tio okazas en rida amika rondo. Karakteriza estas certe nia fonemo 'l' kiu ne estas dentala kiel la internacia (kaj hispana). Tamen mi neniam sentis, ke oni miskomprenis katalunon pro tio, same kiel ĉiu perfekte komprenas la bulgarojn kun ilia gorĝa 'l'. Simile okazas pri tio, ke katalunoj apenaŭ diferencigas la sonojn 'h' kaj 'ĥ'. Tion mi entute ne taksas kiel grava ĉar ne ekzistas en Esperanto du vortoj, kiuj malsimilas nur per tiuj du sonoj. Kaj litero 'ĥ' estas preskaŭ arĥaismo, rare trovebla. Alia signo, kiun ni devas atenti, estas la komenca 'r'. Fakte ja ŝajnas, ke en la Esperanta faŭno ĉiu prononcas tiun kompartindan sonon laŭ sia gepatra lingvo: pensu pri la francoj, angloj, germanoj k.a. Tamen tiun pekon ni povas relative facile eviti ĉar ni ja posedas la malfortan esperantan 'r' inter du vokaloj. Estas necese nur iom atenti, ĝis kiam tiu prononco komence de vorto fariĝos aŭtomata. Estas io tamen en Esperanto, kion mi-kiel ĉiuj katalunoj-neniam sukcesas bone prononci dum flua parolado. Ĝi estas tiu malbenita ofta 'kv' komence de vorto: 'kvar' 'kvin', 'kvankam', 'kvorumo' kc. Laŭ Yzaguirre, kiu ja estas pli bona fakulo ol mi pri fonetiko, la prononco 'gv' regule uzata de katalunoj estas senproblema. Certe per tiu prononco okazas nenioj miskomprenoj. Sed mi tamen estis primokita plurfoje ĝuste pri tio ĉar slavo (almenaŭ serbokroat-lingvanoj kaj bulgaroj) perfekte

prononcas 'k' plus 'v'. Mi tamen rimarkis, ke ili ne tiel akre reagis ĉe 'kfar', 'kfin' ktp. kio certe estas pli akceptebla ol tiu foje aŭdata malagrabra latina 'kŭar', 'kŭin' ktp.

Ĉe kelkaj individuoj estas tre malfacile prononci 'sp' komence de vorto. Tial en hispana aŭ kataluna medio ne malofte aŭdeblas 'especiale', 'espaco', 'especifi', 'espegulo', 'esperta', 'espektaklo' k.a. Mi rimarkis cetere, ke tia problemo renkontiĝas ankaŭ ĉe similaj vortoj, kiaj 'sklavo', 'svarmi', 'ŝvebi' ktp. Tiu ĉi misprononco estas ja laŭeble foriginda, ĉar ĝi estas malplaĉa kaj povas foje naski miskomprenojn. Kiel helpo por tiuj, kiuj entute ne povas ĝuste diri, mi aŭdis la konsilon laŭeble kunigi la malfacilan vorton kun la antaŭa: "mia-s/perta amiko", "per-s/peciala sendaĵo". Mi tuj avertas tamen, ke en modela Esperanto-prononco ne ekzistas vortkunigoj (indas diri "mia amiko" anstataŭ la ofte aŭdata "miamiko"), kaj tial ankaŭ tiu solvo ne estas entute kontentiga. Sed mi konsentas, ke ĝi estas malpli malĝusta ol tiu e-ismo.

Same delikata por multaj fariĝos la eldiro de la vortfinaĵoj. Laŭ eksterlandanoj prave rimarkigis al mi, ni havas ioman tendencon malklare-pli malforte-prononci la lastan silabon. Ni devas atenti pri tio ĉar estas malagrade por aliaj senĉese atenti pri la lasta vokalo de la vorto, kiu ja havas apartan gravecon en Esperanto, speciale kiam ni ŝanĝas la vortordon. Tio fariĝas des pli komplika ĉar la prononco de fina 'a' ĉe orientaj katalunoj iom tendencas al nia neŭtra vokalo, kiu por ne spertaj aŭskultantoj de katalunoj foje similas al 'e'.

Fine mi ŝatus aldoni evidentajn. Tio estas, ke malpli ĝustan prononcon havas tiu, kiu ne parolas (kvankam ja nur tiu, kiu neniam parolas, neniam eraras). Tial estas forte rekomendinde partopreni ĉiajn esperantlingvaj aranĝojn, ju pli internaciaj des pli bone, por ĝustigi sian prononcon, komparante ĝin kun tiu de la aliaj.

Ankaŭ ne estas forgesebla la eminenta rolo por la formiĝo de modela prononco, kiun ludas la Esperanto-elsendoj en la radio. Mi forte rekomendas, speciale al tiuj, kiuj ne tiom povas vojaĝi, foje aŭskulti iun el niaj radio-programoj. Kaj mi eĉ kuraĝus

pri tio varme proponi la parole bonegajn elsendojn de Pola Radio fare de A. Pettyn. Alia ebleco por tiuj, kiuj malfacile kaptas tiujn forajn ondojn aŭ ne volas dependi de ties horaroj, estas aŭskulti la interesan "son-gazeton" eldonitan de LF-Koop, kiu ĉiam troveblas aŭ mendeblas ĉe la libroservo de nia asocio. Cetere tiuj eblecoj permesas al la uzantoj ankaŭ alkutimiĝi pli klare diferencigi la Esperantajn fone-mojn inter si, kaj alpreni pli belan internacian prozodion.

KUNLABORAĴO

LINGVA KURIOZAĴO

de Pedro M. Martin i Burutxaga

★ ESPERANTO

LENGUA INTERNACIONAL

COMENSAMEN DELS NOUS CURSOS

1.^{er} d'Octubre

El Esperanto es una lengua auxiliar que tot home civilizat, deu saber al costat de sa lengua materna per a comunicar-se amb els estrangers.

HORES DE CLASSE

De 9 a 10
CURS DE JOVES
DIMARS I DIJOURS

De 12 a 1
CURS DE SENYORETES
DIARS I DIJOURS

CURS DE NOIS
DIMECRES I DIVENDRES
Per a formar part de «Vendrell's Esperantista Grupo», i aligirse als cursos, serveixinse notificar-ho a un dels individus de la Comissió.

CURS DE NOIES
DILUNS I DIMECRES

Anonco en "El Baix Penadés" (1914)

En mia vilaĝo, kiel en multaj aliaj en Katalunio, ekzistis vigla Esperanto-Grupo dum la unua triono de nia jarcento. Kiam mi kolektis informojn pri ĝi por publikigi artikolon en komarka revuo, mi trovis kelkajn leterojn, malnovajn librojn, poŝtkartojn... sed kio plej plaĉis al mi estis anonceto en loka periodaĵo el la jaro 1914, en kiu aperis jena frazo: "Per (...) aligirse als cursos, serveixinse notificar-ho a un dels individus de la Comissió". Mi neniam antaŭe sciis pri tiu stranga kataluna vorto "aligir-se", kaj posta traŝerĉado en vortaroj konfirmis, kion mi jam suspektis, nome: tiu verbo tute ne ekzistas Ĝi estis sendube katalunigita versio de la esperanta "aliĝi". Tio estas ege interesa. Malgraŭ ke ni ne povas paroli pri vera esperantaĵo (per

tio mi volas diri "esperanta vorto, kiu iĝas ĝenerale uzata en alia lingvo"), ĉar la verbo "aligir-se" estas tute fremda al nunaj katalunlingvanoj, ni povus aserti ke la praktika uzado de Esperanto estis tiam tiel normala, ke la lokaj esperantistoj ekuzis kelkajn katalunigitajn esperantajn vortojn en movadaj kunteksto. Tio ja devis esti ĉiutaga afero, eĉ por iliaj kunvilaĝanoj, ĉar la sama anonceto senŝanĝe aperis dufoje. Mi supozas, ke se la unuan fojon oni trovis tion grava malĝustaĵo en la kataluna, oni ne plu estus publikiginta ĝin denove. Do, malgraŭ ke tiu vorto supozeble ne estis ĝenerale uzata de la neesperantista publiko, eble ĝi ja estis tute komprenata. Kurioza kaj tre maloftega influo de Esperanto en alia lingvo.

LA KVINPETALO, internacia staĝejo de LF-kooperativo.

14-18 aŭgusto 1990: staĝo por la formado de assembleaj kadroj. (Ne multaj kulturoj estas tiom kongresaj, komitataj kaj assembleaj kiom la esperantista; bedaŭrinde al tiu kvanto ofte ne respondas kvalito).

21-25 aŭgusto 1990: staĝo por la formado de respondeculoj pri informado kaj publikaj rilatoj. (Neniu sopra esperantisto opinias ke eblas instrui la lingvon sen metodologia preparo; sed informi pri esperanto estas tasko eĉ pli delikata, kiu postulas adekvatan preparon. Bedaŭrinde ofte ni improvizas nin informistoj, tre kontraŭefike).

KALENDARO DE ARANĜOJ

La konata aksiomo ke Esperanto estas ege facila lingvo ne trompu vin: malgraŭ tio, oni devas ĝin daŭre praktiki kaj tio eblas nur per partopreno en esperantaj aranĝoj, ĉefe internaciaj, kie oni malmulte krokodilu. Sekvas listo de tiuj renkontiĝoj okazontaj baldaŭ kaj proksime.

23-25 marto-la Igualada Rendevo kun kultur-kaj-amuza programo.
26/3-4/4-"Kulturo de Kreskado" en Zagrebo. Aranĝo dediĉita al la internacia jaro de alfabetigo.
14-17 aprilo-45a Sat-Amikara Kongreso en Bondy, proksime al Parizo.
28-29 aprilo-KEJ-Kunveno en La Poble de Lillet.
5-6 majo. Kongreso de Federacio Lanĝvedoko-Rusiljono en Alès.
11-25 majo-en Zadar (Jugoslavio).
"Esencil"-Eŭropa Seniora Celprogramo por la Internacia Lingvo.
19-21 majo-KEJ-vizitado de la romania arto en la "Vall d'Aran"
1-5 junio-82a Franca Kongreso de Esperanto en Blois. La fama loka kastelo estos la kongresejo.
8-10 junio-en Zagrebo. "Kafejo Zagrebo"
29 junio-6 julio-Internacia Esp. Semajno en Nico.
30 junio-1 julio-KEJ-aranĝo en Horta de St. Joan.
14-18 aŭgusto-Staĝo por la formado de assembleaj kadroj en La Kvinpetalo.
21-25 aŭgusto-Staĝo por la formado de respondeculoj pri informado kaj publikaj rilatoj en La Kvinpetalo.
30 aŭgusto-4 septembro-en Zagrebo 23a PIF (Pup teatra Internacia Festivalo)
Aparte laŭ spacebleco ni ampleksigos la informon de la enlistigitaj aranĝoj, sed tamen ni pretas volontem sendi la kompletan informilon al ĉiuj petantoj, kontraŭ 20-peseta poŝtmarko por la afranko.

kata luno

oficiala revu(j)o de kataluna esperanto-junularo/marto-oktobro '89/n-roj 21-22-23!!

Post kelkmonata paŭzo denove aperis la revuo KATA/LUNO de nia junularo, kiu sur 24 paĝoj informas nin pri tre interesaj sciindaĵoj, kiujn sekve ni klopodas resumi:

Enkonduke ni klarigu ke ĝia nova aspekto ege ŝokis nin pro ĝia sobereco, kompare kun tiuj de la antaŭa periodo.

Unue la redaktoroj klopodas pravigi la prokraston, kio ĉefe ŝulsiĝas al la duobla ŝanĝo de redaktoro, cetere ili petas daŭran kunlaboron.

Sekvas artikolo pri la rilatoj KEJ-TEJO kaj pri la definitiva oficialiĝo de KEJ kiel Landa Sekcio, kio finfine konfirmiĝis en la lasta junulara Kongreso en Kerkrade (Nederlando). Ĉu KEJ kuraĝos organizi la Junularan Kongreson en 1993 en Katalunio, laŭ neoficiala propono de TEJO? Aperas la alvoko al la 3a Katalunia Belatra Konkurso "Nova Futuro" por instigo de la junaj verkemaj generacioj.

Oni reproduktas artikolon de la juna germana aktivulo Thomas Pusch, kiu raportas pri sia partopreno en la Forumo "Joves i Futur" oficiale invitita de la kataluna registaro.

Gojiga novaĵo estas la apero de la unua kantareto de KEJ, pri kiu la revuo informas. Temas pri 96-paĝa libreto 21'5 x 16 cm kun 40 kantoj kaj tre belaj ilustraĵoj. Kostas 600 p-tojn.

Mezaj paĝoj informas pri junularaj internaciaj aranĝoj dum la venontaj monatoj. Du poemoj, ege modernaj laŭ enhavo kaj formo de Carles Berga, la nova talento kiu enpaŝis en la publikan literaturan scenon gajninte la 1an Konkurson "Nova Futuro".

Artikolo informas nin pri IJS (Internacia Junulara Semajno) ĉiujare en Hungario. Interesa raporto pri IJK (Internacia Junulara Kongreso) de Betty Maul, germana aktivulino.

La rilatojn kaj kunlaboron de KEJ kun la neesperantista kultura asocio "Enllaç", oni legas en artikolo tripaĝa. La eksterigo de nia afero, malfermas novan perspektivon por nia movado.

Sekvas polemika artikolo, kiu supozeble skuos iajn movadanojn, pledanta por pli aktiva eksterigo de nia afero. Per traduko de skribaĵo de la kataluna verkisto Gabriel Ferrater, raporto pri la partopreno en la Kataluna Somer-Universitato en Prada kaj distriga paĝo, finiĝas la revuo, sed tamen, la lasta paĝo, mem kovrilo, informas pri la unua laborkunveno de KEJ EN Cardona okazinta en januaro, sed per aparta cirkulero ili anoncas sinsekvajn ĉiumonatajn kunvenojn ĝis junio/julio. Nia junularo meritas sinceran aplaudon pro ilia antaŭplanita kaj entuziasma agado.

KCE

La feriejo GASTEJO EDMOND PRIVAT de Kultura Centro Esperantista (Chemin des Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) estas dum la tuta jaro ideala hejmo por studemaj kaj promenemaj esperantistoj. Petu la informilon!

13-16 aprilo 1990: La montaro Juraso ekprintempe (Paska plilongigita semajnfino) Gvidos Claude Gacond.

16-21 aprilo: Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj. Instruos C. Gacond, F. Degoul, S. MacGill.

19-20 aprilo: Esperanto-ekzamenoj laŭ la normo de UEA-ILEI.

23-28 aprilo: Esperanto-staĝo.

28 aprilo: Ĝenerala Asembleo de KCE.

28-29 aprilo: Studa semajnfino.

21-26 majo: Esperanto-staĝo.

26-27 majo: Studa semajnfino. Preleganto Pierre Babin, direktoro Kastelo Grésillon.

28 majo-2 junio: Esperanto-staĝo.

2-4 junio: Studa semajnfino pri arbaro (en arbaro kun arbaristo). Gvidos: Luigi Barbana.

4-9 junio: 5a Seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj. Gvidos: B. Eichkorn kaj R. Bossong.

4-9 junio: Esperanto-staĝo.

18-23 junio: Esperanto-staĝo.

23-24 junio: Studa semajnfino.

25-30 junio: "La Infana Raso" de W. Auld. Instruos: Istvan Ertl.

GEEDZIGO

Jesús Abel Montagut kaj Montserrat Martí geedziĝis pasintan novembron. Ni sincere deziras al ili eternan feliĉon.

INVITO AL INTERKIBERNETIK'90, POPRAD (ĈSSR) 1990-09-12/14 sub la auspicioj de Sekcio 1 de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino okazigota kunlabore kun Internacia Kultura kaj Kleriga Centro (IKKC) Poprad (ĈSSR) de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS) San Marino

Konferencestro: OProf. Dr. V. Mužić, Dekano de Sekcio 1 (Kibernetiko) de AIS, Filozofia Fakultato (Pedagogio) de la Universitato de YU-41000 Zagreb, Avska 77, P.F. 167

Ĝenerala Sekretario: ADoc. Dr. Dan Maxwell p.a. BSO, Postbus 8348, NL-3503 Utrecht

Direktoro de la loka kongresa komitato: Inĝ. Milan ZVARA, direktoro de IKKC, Leninovo nabr. 33, CS-058 Poprad, tel.: ...92-22241 (vespere), ...92-32419 (tage)

Laborlingvoj: La Internacia Lingvo (ILO), la Angla, la Franca kaj la Ĉeĥa/Slovaka (IKKC zorgos pri traduko en ILO)

Sekcioj: Antropokibernetiko (kun psikokibernetiko, lingvokibernetiko, kibernetika pedagogio k.a.) Ĝenerala Kibernetiko kun informadiko Inĝenierkibernetiko (kun komputila aparataro, aŭdvida teknologio, automatigo, regulad-teknologio ktp.) Biokibernetiko kun kibernetika ekologio.

Speciala simpozio: La reutiligo de klerig-teknologiaj ekkonoj el la jaroj 1962-1972.

Kursoj: IKKC (Inĝ. Zachariáš) okazigos rapidkurson „ILO por sciencistoj“ antaŭ la kongreso.

AIS okazigos kurson „Enkonduko en la Interlingvistikon“.

Kadra programo: IKKC organizos por ĉiu vespero kulturalan programon: folkloro, lumbildoj, danco.

Ekskurzo en la Tatron: sabaton, 1990-09-05

La kutuzo por INTERKIBERNETIK'90 inkluzivas la kadran programon kaj la konferencaktojn kaj estas rabata je 40%. se oni antaŭpagas al la subkonto TAKIS ĉe AIS per poŝtirokonto 2051-305, poŝtiro-oficejo Hannover, bankkodo 25010030 JAM ANTAŬ LA JARFINO 1989 (alveno de la kontenturo plej malfrue la 15an de januaro 1990).

Kotizkategorio 1 inkluzivas ankaŭ maten-, tag- kaj vespermanĝojn kaj la tranoktojn en 1-lita hotelĉambro (kun necesejo kaj bankuvo): 2.5 AKU, t.e. 250,- DM (por fruuliĝantoj: 1.5 AKU) - aliĝojn laŭ kategorio 1 TAKIS akceptas nur kun antaŭpago ĝis plej malfrue 1990-05-31! (Por 2 personoj en samkvanta 2-lita hotelĉambro: po 2 AKU.)

Kategorio 2 inkluzivas la saman kiel kategorio 1 sed kun tranokto en la kongresejo (IKKC) kiu konsistas el fidele rekonstruita; malnovaj domoj en la sama urbocentro; en la domoj troviĝas krom la prelegejoj ankaŭ junulargastejcaj tranoktejoj, 1.5 AKU (por fruuliĝantoj 0.9)

Kategorio 3 ne inkluzivas tranokton kaj manĝaĝon: 0.5 AKU (por fruuliĝantoj: 0.3)

Pagante surloke 150 Kronojn al IKKC ĉi tiu klopodos helpi en la trovado de ĉambroj evt. ce privatuloj.

Limdato por preleganonco (kun duonpeĝa resumo) 31a de marto. La programo estos sendata al la aliĝintoj ekde la junio 1990.

Kromajn informojn - ankaŭ pri alveturado (precipe el San Marino, Budapeŝt kaj Praga) kaj pri pluveturado (precipe al la studadesio de AIS planita en Bialystok) - havigas IKKC.

edistudio, c.p. (poŝtako) 213 - I-56100 Pisa, Italujo

fizika adreso: via Gierdano buno 8 - I-56125 Pisa - It. t. 050/5048670

+39/50/500585 - ccp (p&k) 12270561 roma - p.iva (avi) 00416120509

Edistudio di brunetto casini

Edistudio... la arto eldoni

Daŭra mendo -- por ne maltrafi la okazon

La vivo foje estas malfacila, por regula leganto de Esperanto-libroj: tralegi sennombrajn gazetojn, por scii kiuj libroj aperis, mendi ilin al libroservoj esperante, ke ili jam akiris la deziratan volumon, aŭ al eldonejoj, ofte en foraj landoj, atendi senpacience la libron por vidi, ĉu vere valoris la aceto, barakti kontraŭ poŝtaj kaj bankaj instancoj por paĝi ĝin...

Nun Edistudio helpas al vi eviti kelkajn el tiuj problemoj: "Daŭra mendo" estas servo, ĝis nun rezervita al libroservoj kaj revendistoj, kiun nun Edistudio proponas al ĉiuj siaj klientoj: per simpla poŝtkarto al "Edistudio, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo" vi ricevos tuj post ilia apero ĉiujn librojn, kiujn Edistudio eldonos (kaj per alia poŝtkarto vi kiam ajn povos nuligi la servon).


Vi ricevos la librojn post ilia eldonado, sen aldono de sendokostoj. Se via mendo estas por pluraj ekzempleroj, vi ankaŭ rajtos al aparta rabato. Vi pagos post la ricevo de la libroj, per la poŝtĉekkonto de Edistudio aŭ per via konto ĉe UEA (aŭ per banko, sed tiam aldoniĝos la bankkostoj, kiuj en Italujo estas sufiĉe altaj).

Cetere, pri la kvalito de la ricevotaj libroj ne estas duboj: rigardu ekzemple la lastajn proponojn de la itala eldonejo: Itala Antologio, la plena poemaro de William Auld En barko senpilota, Aŭstralia Antologio. La venontaj proponoj estas je la sama nivelo, kiel vi malkovros malfermante la pakojn, kiujn vi ricevos per via "Daŭra mendo".

Bruĉjo Kasini

NEKROLOGO

La 28an de februaro 1990 forpasis en Vilanova i la Geltrú la veterana esperantisto Rafael Toledano, 77-jara. Ni sincere kondolencas lian familion.




PALAMÓS

Nia bela marborda urbeto gastigos la 30ajn Internaciajn Florajn Ludojn dum venonta aŭtuno. Nia Asocio samtempe omaĝos la memoron de la kataluna esperantista pioniro Frederic Pujulà i Vallès, kiu naskiĝis ĝuste en tiu urbeto.

(Pli detala informado aperos en venonta revuo)

KRUCVORTENIGMO N-RO 4 de Pedro M. Martin i Burutxaga



HORIZONTALALE:

1. Veturilo (10)
2. Aŭtomobila simbolo: Germanio (1). Fortega vento (7)
3. Monato (4). Aŭtomobila simbolo: Malagasio (2). Kriptono (2)
4. Kvar (2). Meblo por manĝi, skribi, ktp (5)
5. Tre malhela (5). Arbo (4)
6. Unu (1). Foliaro el papero kun presita teksto (5). Lirika poem' (2)
7. Konsekvence (5). Greka litero (4)
8. Teknecio (2). Angla biero (3). Monunu' (3)
9. Prefikso (neoficiala) signifanta movon kontraŭe al la normala direkto (5). Meti objekton al pli alta nivelo (4)
10. Pensoj (5). Itala rivero (3)

VERTIKALE:

1. Zorgi pri la financaj aferoj de homo aŭ organizo (10)
2. Duonvokalo (1). Aldonvalora Imposto (3). (inverse) Kiel estas juste (4)
3. Senprokraste (3). Tri konsonantoj malsamaj (3). Teluro (2)
4. Metallo (3). Fluanta akvomaso (6)
5. Aŭtomobila simbolo: Maroko (2). Dio donis du al Moseo (7)
6. Simila al kruela giganto el fabeloj (4). Konsonanto (1). Oksigeno (1)
7. Altegaj tropikaj herboj (7). (inverse) Aŭtomobila simbolo: Polujo (2)
8. Sufikso (2). Du konsonantoj egalaj (2). Likvaĵo por friti (4)
9. Maŝino, kiu tiras trajnon (10)
10. Vokalo (1). Aŭtomobila simbolo: Rumanió (1). Impresi la flarsenson (1)